# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris 34, rue de Chabrol PARIS -10° tel.770-55-03

NOVEMBRO - DECEMBRO 1972 N° 2

## L' E N N E M I N-° U N

La vie est un combat; cela a été souvent dit et écrit. Plus particulièrement, je puis affirmer que la vie du mouvement espérantiste est également un combat, et, si notre mouvement perdait sa combativité, s'en serait bientôt fait de lui, car il à affaire à un ennemi de taille. Cet ennemi est multiforme: c'est ce qui le rend tellement redoutable.

Il y a d'abord ceux qui sont résolument contre l'Espéranto. Ils ne sont pas nombreux, mais ils existent. Très nombreux, par contre, sont les indifférents qui constituent un ennemi dangereux par sa passivité. Je le compare à un immense édredon qui enveloppe mollement notre cause et qui pourrait bien l'étouffer.

Il y a un troisième ennemi; de celui-là seul je veux parler aujourd'hui.

Dès l'origine de l'Espéranto il existait et il est toujours présent à la manière d'une 5ème colonne. On le retrouve dans toutes les sociétés humaines, car il vit en chacun de nous sous une forme ou une autre. Il est, hélas ! facile à décrire: Orgueil, vanité, susceptibilité, présomption, paresse, "y-a-quèisme", "faut-qu'on-manie", avarice, manque de générosité, logorrhée, idée fixe, entêtement, sectarisme, intolérance, flatterie, jalousie, critiques malveillantes, coups d'épingle, coups bas, maniaquerie, pessimisme, optimisme béat ..... etc,....

Le signataire de ces lignes n'est pas tendre pour ce troisième ennemi; il s'efforce de ne pas lui prêter flanc et de lui donner de temps à autre quelque bonne correction. Je vous invite donc au combat contre cet ennemi N° 3, lequel, tout compte fait, est bel et bien l'ennemi N° UN !

Si un lecteur se récriait: "Il exagère celui-là avec ses sermons !", cela prouverait qu'il n'a pas bien compris ce que j'ai écrit, ou bien que moi-même je n'ai pas su me faire comprendre. Quoi qu'il en soit, retenons tous que la victoire dépend essentiellement du tonus moral des combattants. Alors? -

Alors, j'ai la ferme conviction que nous nous sommes bien tous compris.

Bon courage à tous !

R. Despiney

---

**DEUXIEME SOIREE JAPONAISE**
avec un nouveau programme

Mercredi 15 Novembre 1972, à 19 H

-o-o-o-o-

Musée Guimet - 6 pl. d'Iéna -Paris
(métro : Iéna)

Audition d'instruments à cordes et à percussion - Danses - Diapositives

Venez nombreux avec parents et amis même non espérantistes.
(traduction française assurée)

---

**Z A M E N H O F A V E S P E R O**

Vendredon la 15an de decembro 1972, je la 19a. Gare saint Lazare Galerie des Marchands- Salle du photo-club SNCF.

Okaze de la Internacia Libro - Jaro, niaj geamikoj Bernard, Mousset kaj Thierry prezentos tri librojn.
AMIKA SURPRIZO

ATENDOS VIN !!!

## K O T I Z O J

La KASISTO memorigas al la membroj ke la kotizoj estas pageblaj jam de NUN por la jaro 1973. La anoj de la Pariza Grupo pagu al ties kasisto: (Groupe Espérantiste de Paris CCP 806 266 - Paris). La aliaj membroj pagu al Fédération Parisienne Espéranto : CCP 10482 04 Paris.

En la ĉi suba tabelo, vi povas konstati ke ekzistas ankaù Kotizo tre malalta ( 8 F. ),kiu fakte estas kvazaù helpa kotizo. Ni sugestas al niaj membroj uzi ĝin por siaj kunul(in)oj (edzo, edzino eĉ parencoj), se ili ne deziras aù povas pagi du aù pli plenajn kotizojn je 38 F.

U.F.E.
- Membre adhérent.............................. 8 F.
- MEMBRE TITULAIRE............................ 38 F.

U.E.A.
- Cotisations s'ajoutant aux précédentes :
- Membro - Jarlibro........................... 25 F.
- Membro - Abonanto........................... 50 F.

Concernant les moins de 25 ans, voir page 5 les informations de J E F O -

## L E S C O U R S

-RAPPEL DES COURS ANNONCES DANS LE PRECEDENT BULLETIN.:.................

SPLEF, 2, rue Gabriel Vicaire PARIS:2ème degré. Samedi 10 à 12 H.

Association Philotechnique: Lycée Condorcet, 8, rue du Havre, PARIS, les mardis à 19 H.

BOURG-la-REINE :s'adresser :Mame Amariglio, 5, rue René Roeckel 92340 - Bourg-la-Reine - Tel. ROB 97-26 -

LE PERREUX-sur-MARNE : Mr R. Despiney, 43, quai de Champagne 94170 Le Perreux-sur-Marne - Tel. 324 20-10 -

SAINTE-GENEVIEVE-des-BOIS : Mr H. Henry,9, résidence Rochebrune 91220 - Brétigny-sur-Orge -

- NOUVEAUX COURS - : ................................................

- Salle de l'Association Amitié & Loisirs: 91, rue de la Chapelle PARIS - Le mardi de 20.30 à 21.30 - Mr A , Bourdeaux -

- 1 bis, rue d' Athènes, 2ème Etage : le mercredi à 18 H. Mame Mousset et Mr J. OTT. -

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NI UZU NEESPERANTISTAN LOKAN GAZETARON - 1972 : S-ino Amariglio (Bourg-la-Reine, Antony), S-ro R.Despiney (Le Perreux-sur-Marne), S-ro H. Henry (Sainte-Geneviève des-Bois , Etréchy), aperigis artikolojn pri Esperanto en diversaj lokaj gazetoj.

PRI "LA RETO". Denove kafej-teatro Absidiole konsentis, ke la Pariza Esperantista Grupo ludu la Reton de Bukar dum du semajnoj, de la 22-a de Aùgusto ĝis la 3a de Septembro. La rolon de Monika prenis Sylvie Bonnet, kaj tiun de Hans Kegel.... laaùtoro mem, anstataùante Michel Audibert, kiu bedaùrinde rompis kruron! Broutin ludis la du rolojn de la leterportisto kaj de la vinportisto, kiel li jam faris lastan jaron. Sed...ho ve! La trian tagon, ĵaùdon la 24-an, troviĝis eĉ ne unu spektanto; ludado ne okazis. La postan tagon, vendredon, estis nur Philippe Laudenbach, nevo de Pierre Fresnay; nur por li la aktoroj ludis; kaj sabaton, denove la teatro estis tute malplena... Tiam la trupo decidis ĉesigi prezentadon.

Certe multaj homoj ferias Aùguston; sed ne ĉiuj.Tiam troviĝas en Parizo Esperantistoj, kiuj povis kaj devis ĉeesti. Eble ili atendis la duan semajnon por veni, pensante ke la aktoroj pli bone ludos! Sed ili devas konscii, ke tiel agante ili mortigas E-teatron, esencon de nia kulturo, kaj senfruktigas la strebojn de la aktivuloj, kiuj sindone dediĉas tempon kaj monon por vivigi la E-movadon.

Nu, ni esperu, ke venontan jaron la P.E.G. denove ludos alian teatraĵon, eble de alia verkisto, kaj ke ĝi estos sukcesa.

PARIS-ESPERANTO — Skuata sed ne dronanta — Informoj de la Pariza Grupo —

La 14-an de oktobro okazis grava kunsido de la Konsilio...

Efektive dum la jaro eksiĝis sinsekve tri el la ses estraranoj (el ili antaŭ nelonge la prezidanto) tiel, ke la grupo iĝis senkapa kaj la konsilianoj devis ekzameni la estigitan situacion.

La lastjara agado tamen ne estis nula: - trisemajnaj prezentadoj de la "Reto" en "Absidiole", kunvenoj ĉiuĵaŭdaj de la Konversacia Rondo, - Zamenhofa komuna vespero, - trireĝa kukovespero, - trimonataj vespermanĝoj, kursoj en "Philotechnique", la "SPLEF" kaj "Touring-Club". Eĉ se en la kvaran vespermanĝon venis nur du membroj, kio do ne glate funkciis?

Ĉu vero, ke ĉiuj membroj nun seninteresiĝas je kunvenoj, kaj - kiel deklaris unu el la ĉeestantoj - venis la tempo, kiam tiu iam fama grupo, kiu, fondita en 1901, konis la aktivecon de C.Bourlet, T.Cart, M.Rollet de l'Isle, L. Bastien kaj R.Schwartz, devas vole nevole dissolviĝi en pli vastan federacian kadron?

Grupa vivo estas nepre necesa kondiĉo por vivanta lingvo, ĉar kiu neniam ĉeestas kunvenon, iom post iom perdas la lingvan uzeblecon: komunikado postulas dialogon.

Ĉu vero, ke la seninteresiĝo de la membroj ŝuldiĝas al manko de taŭga loko por kunvenoj? Aŭ ĉu la nuntempaj geparizanoj estas tiel "ŝraŭbitaj" sur sia aŭtomobila seĝo aŭ hejma fotelo, ke de nun ili povas malhavi nek la haladzojn de la benzingasoj nek la reklamojn de la televidekrano?

Homa vivo tamen estas sociema: nur en kaj per sociaj rilatoj ĝi atingas sian plenumiĝon. Individua izoliteco kondukas al enuado, kiel oni ne malofte konstatas en la hodiaŭa mensostato.

Ĉu vero, ke la manko de volontuloj venas de la tro ofta seninteresiĝo de la membroj? Aŭ ĉu necesas espero por entrepreno kaj sukceso por persisto? Dum la pasinta jaro pli kaj pli kreskis la partoprenado en la Konversacia Rondo...

Nu...kiel diris la poeto:

"Kaj se nur unu restos, ja estos mi ĉi tiu..."

La Konsilio elektis novan estraron, kiu prezentas al vi tripunktan planon de revigliĝo.

<u>1°-RESTARIGO DE ĈIUSEMAJNA KUNVENO</u>.Loko estas serĉata... Vendredo ŝajnas la plej oportuna tago. La kunveno povus malfermiĝi je la 18-a, kaj ĝia oficiala parto okazi de la 19-a ĝis la 20-a. Tiel, kiuj poste dezirus kune vespermanĝi, povus facile tion fari; kaj kiuj loĝas tro malproksime, ankaŭ povus frue hemeniri.

<u>2° -DISKUTADO PRI LA TRIA LABORPLANO DE UEA</u>.La Estraro de UEA decidis malfermi en la revuo "Esperanto" novan rubrikon por diskuti pri la nova laborplano. Jen do por ĉiuj oportuna momento pripensi kaj proponi agoplanon por la tuj venontaj jaroj.

<u>3° - PREPARADO DE LA FEDERACIA KONGRESO 1973</u>.Tiu ĉi estas antaŭvidita por la 29-a de aprilo. Ĉiuj bonvolulоj kaj emeritoj jam pripensu, kiel tia kongreso povos marki novan etapon en la vivo de la grupo.

Jen do konkreta propono de nova estraro, kies aktiveco trovis favoran aŭspicion en la komuna vespero pri "japana kulturo". Sed ne forgesu, ke en la kadro de tia propono ĉiuj ideoj "viaj" estos bonvene diskutindaj: ne hezitu konigi viajn sugestojn, interalie pri la elektota loko. Vivas grupo nur de ĉies partopreno. Ek!

La prezidanto.
Jean Thierry.

Estraro de la Pariza Grupo

| | |
|---|---|
| Prezidanto | J.Thierry |
| Vic-prezidantoj | A.Bourdeaux, E.Gaudry |
| Sekretario | R.Doury |
| Helpsekretario | H.Henry |
| Kasisto | J.P.Peray |

## PASINTAJ KUNVENOJ

MEMORE AL F-INO PAULIER - Cento da personoj ĉeestis la ceremonion memore al la sekretariino de U F E , F-ino PAULIER, kiu okazis la 29an de Septembro en la preĝejo Saint Vincent de Paul. La meso estis celebrita en esperanto fare de pastro Goudé, el Le Viel Baugé, helpata de Frato Marmou. Ĉiu ĉeestanto ricevis la esperantistan tekston de tiu ceremonio; tio faciligis ilian personan partoprenon.

SAINTE GENEVIEVE-DES-BOIS -(1an OKT 1972) -Bela suna vetero aùtuna obligis agrablan partoprenon en la diversaj eroj de la Esperanto-Tago organizita bonege de g-roj HENRY.

Per aùtobuso, la dudek-kvin partoprenantoj veturis ĝis proksime de la Rusa Preĝejo; post vizito de la rusa tombejo kaj de la moderna naĝejo, la grupo promenadis tra la novaj kvartaloj, preterpasante la domon de Soufflot (arĥitekto de la Panteono en la urbo Parizo). Survoje halto permesis viziti la groton de S-ta Genovefa antaù ol alveni al la parko, kie okazis la tagmanĝo. Tiu tagmanĝo estis aranĝita laù kampara maniero (aù ankaù skandinavia maniero). La programo de la posttagmezo okazis en la salonoj de la Kulturdomo Gérard Philipe. Tie oni povis viziti filatelan ekspozicion, ĉeesti prezentadojn de diapozitivoj. Entute, bonega okazaĵo, kiu meritos venontan fojon multe pli da partoprenantoj.

J. Rousseau

LA HOUSSAYE-EN-BRIE -(1an OKT 1972) - Ni estis nur dek-unu ĉe la Misiofratoj tiu dimanĉo, ĉar samtempe okazis interesa kunveno en Sainte Geneviève-des-Bois. Fervore ni partoprenis la celebradon de la sankta Meso en la vilaĝa preĝejo, kaj post komuna manĝo vizitis kiel kutime, sed ĉiam interese, la parkon, la ĝardenon, kaj la abelujon, pritraktante la vivon de la abeloj kaj de kelkaj altaj arboj. En la kapelo ni preĝetis, kaj frato Marmou klarigis al ni la sencon de la vitraloj montrantaj la ok beatecojn. Sur parkaj benkoj ni sunumis nin en parolrondeto, dum pastro Goudé el Le Viel-Baugé kaj S-ro Despiney regalis nin per spritaj ŝercoj kaj portlandaj novaĵoj en bona esperanta stilo.

Kun bedaùro sed kun kelkaj potoj da mielo, ni impetis en la serpentuman aùtovoston por hejmen veturi.

J. Kreamer

PARIZO -(19an OKT 1972) - Multnombra ĉeestantaro preskaù plenigis la subteran salonegon de la Muzeo Guimet okaze de la kunveno, preludo al la Ekspozicio "ONISABURO kaj lia Skolo" videbla ĝis la 17a de Decembro 1972. Ĉeestis ankaù pluraj gejapanoj en tradiciaj kostumoj. S-ro UMEDA malfermis la kunsidon kaj poste prezentis la diversajn erojn de la programo. S-ro Deguĉi parolis pri Oomotokaj ĝia agado.

La ĉeestantoj eble estis surprizitaj de la malrapideco i.a. de la Noo-dancoj, kiuj tute kontrastas kun la kutima ritmo de niaj nuntempaj okcidentaj dancoj. Ili verŝajne pli facile komprenis la dancon kun la sunombrelo.

S-ro Eizo Itoo parolis pri la japana vivo kaj montris per lumbildoj diversajn aspektojn de Japanujo. La filmo, kiu estis la lasta ero de la programo, tre detale komprenigis la manieron fabriki la artajn potetojn, kiujn oni povas vidi en la Muzeo Cernuschi, kaj kiuj estas vera plezuro por la okuloj.

J.R.

---

*** l' art de O N I S A B U R O et de son E C O L E ***

Exposition organisée par S-ano UMEDA avec la collaboration

des espérantistes de la région parisienne

au M U S E E C E R N U S C H I

7, Avenue Vélasquez PARIS (8) -Métro : Monceau -

Jusque au 1 7 D E C E M B R E 1 9 7 2 .

Ouvert tous les jours sauf le mardi de 10 H. jusqu'à 17.30 H.

Prix d'entrée : 4 francs ..

---

# J G P R

## JUNULARA GRUPO DE LA PARIZA REGIONO

Antaŭ komenci tiun artikolon, mi nepre volas danki la Parizan Federacion kiu donacis, en tiu-ĉi numero, tutan paĝon al JGPR.

Bone!... Sed,... Kio estas JGPR ?

JGPR devus signifi Junularan Grupon de la Pariza Regiono. Mi bone diris: "devus", ĉar ĝis nun ĝi estas nenio. Efektive, jam de pluraj jaroj, aro da gejunuloj (ne pensu ke en tiu frazo "aro da" signifas amason da...) provas pli malpli regule kunveni en Parizo. Kelkaj novaj anoj venas, kelkaj foriras, kaj NENIO RESTAS!....

Pro diversaj kialoj, (problemoj de administrado, problemoj de strukturigo, ktp...), ni ne sufiĉe fortas por lanĉi tute sendependan asocion. Do, kial ne agi en la sino de la jam ekzistantaj asocioj. En tiu senco, ke ni unue aliĝu al tiu asocio kaj ke ni agu por ĝi kaj tra ĝi. Tiel, ni, per nia nombro kaj laboro, fortigos la asocion kaj vivos dank'al ĝi.

Mi ne tuj nomis tiun asocion, sed certe vi jam komprenis ke temis pri la Pariza Federacio mem....

Por ke ne estu ĉiam la samaj kiuj laboros en la kreado de tiu nova asocio, la JGPR serĉas agemulojn (≠ ronkemulojn) por plenumi la sekvantajn postenojn: Prezidant(in)o; Sekretari(in)o; Kasist(in)o; kaj redaktoro por tiu paĝo.Petu informojn ĉe: Dominique Despiney, 43, Quai de Champagne, 94170 LE PERREUX.

## "NIA KELO."

Ni trovis, en la kvartalo "Le Marais", mirindan belegan kelon!.... Ĝi estas senpage je nia dispono por fari kunvenojn diversspecajn. Sed, necesas antaŭe ĝin purigi.... Ni, do,.... denove petas vian helpon por fari laborgrupon. Agemuloj telefonu al Dominique (324 20 10, ĉiutage inter la 7a ĝis la 9a vespere).

## UZU KSM....

La Koresponda Servo Mondskala de UEA, ne sufiĉe ricevas da korespondpetojn flanke de la franca junularo!... Male, el socialistaj landoj venas multege da petoj por korespondi kun junaj francoj.... Do, Vi uzu la Korespondan Servon Mondskalan, 12, Rue des Jacobins, 63000 CLERMONT-FERRAND.

---

La KOTIZ-TABELO aperos en la venonta numero.....

- LERNJARO 1971 - 1972 - REZULTOJ DE LA EKZAMENOJ EN LA PARIZA REGIONO.

ATESTO PRI SIMPLA LERNADO -S-ro AUDIER Daniel, S-ro ARGYRIADES, S-ino BAILLON, S-ro BELTRAN Robert, S-ino BENAZECH Claudia, S-ro BENAZECH Daniel, S-ro CAVALIER Guy, S-ro COUFFEL Alain, S-ro DELATTE Michel, F-ino FAYE Christiane, S-ro HORN Gérard, F-ino KAUFMANN Paule, S-ro LEROY Philippe, S-ro MASCARELL Fernand, S-ro MAYOUSSE, F-ino MOURADIAN Laurence, F-ino PERMENTIER Francine, F-ino ROSTAND Armelle, S-ino SICHEL Paulette, S-ro TSALKOVITCH Gérard, S-ino VIDAL Paule S-ino WICTOR Odette.

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO -S-ino BAUDRY Giselle, S-ro BAUDRY Claude, S-ro KRAEMER Joseph, S-ro ORTI Julien, S-ino PLANTIVEAU Huguette, S-ro ROUET J.LOUIS.

ATESTO PRI KAPABLECO - S-ro DESPINEY Roger.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

## E N L A P A R I Z A R E G I O N O

Ĉiu esperantisto interesiĝas pri iu ajn esperantista manifestacio, ĉar li scias ke la disvolviĝo de Esperanto dependas de la agado de ĉiuj.

Pro tio ni mencias sube la diversajn manifestaciojn, kiuj okazis en la pariza regiono. Kvankam ili ne estis organizitaj de la pariza federacio, tamen en ĉiuj ĉeestis anoj de tiu ĉi federacio.

- Pentekosto 1972 - Kutima kaj ĉiam interesa S.A.T.-tendara-kunveno en la "sabla maro" de Nemours.
- 29-30 an de aprilo - Kongreso de la Franca Katolika Asocio en Saint-Germain-en-Laye kun diservo en Esperanto.
- 26 an Julio ĝis 2 an de Aùgusto - Internacia Kongreso de K E L I en la Rochette apud Melun. Partoprenis 70 kristanoj.
- 9-10 an de septembro - Dum la popola Kermeso de la ĵurnalo 'L'Humanité" esperantistoj de la Laborfederacio havis en sia budo okazon diskonigi grandskale Esperanton.
- 11 an de septembro - 10 a datreveno de la ĉiulundaj ESPERANTO-renkontoj, ĉe "ma Bourgogne" 19, place des Vosges en Parizo. En la ĉeesto de s-ro KRIEG, deputito, membro de la Eùropa Konsilio kaj de S-ino GARNIER-LANCON, membre du Conseil Municipal de Paris, pli ol 60 personoj partoprenis tiun amikan kunvenon. Prelegetis nia estimata profesoro LAURAT. Agrable dancis la fervojista grupo.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

## -------- K A L E N D A R O -------

- 15 an de novembro : Japana Kunveno (vidu ĉe la paĝo 1 a)
- 18 an de novembro : Estrara Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.30 H.
- 9 an de decembro : Konsilia Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.30 H. Iu ajn rajtas partopreni kiel observanto.
- 15 an de decembro : Zamenhofa Vespero (vidu ĉe la paĝo 1 a)
- 12 an de januaro 1973- TRIREĜAKUKO-KUNVENO - v e n u a m a s e .Pliaj informoj estos donataj en la venonta bulteno. r e z e r v u v i a n v e s p e r o n ! ! !
- Dimanĉon 29 an de aprilo 1973 : FEDERACIA KONGRESO .
- Pentekosto 1973 : en Luksemburgo : Nacia Franca Kongreso kaj Eùropa Kongreso.

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

Dès que vous recevez une information au sujet d'une réunion qui doit avoir lieu à une date donnée, veuillez aussitôt noter cette date sur votre calendrier.
Si pour cette réunion il y a nécessité de s'inscrire avant une date donnée, notez-le également sur votre calendrier.
C o n s u l t e z s o u v e n t v o t r e c a l e n d r i e r..............